

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penceoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 penceoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 69 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 marto 1926

ESPERANTO LITERATURE — WORLD WIDE.

In most countries where Esperanto is used and in which esperanto magazines are published, a tendency exists to abolish altogether or at least to reduce the number of small periodicals. The feeling among leading esperantists is that the movement will be better served by supporting fewer magazines with articles of a literary nature contributed by acknowledged writers of good style esperanto.

The progress of time has evolved, and still is evolving, a truly esperanto type of literature, an international world language type, capable of being understood and appreciated by peoples of widely different national aspirations, culture and education. Many esperantists hold the view that esperanto has now reached a stage in its history where journals, which are merely a means for recording the progress of the language, are more or less superfluous. It is claimed that a strong demand exists among the ever increasing number of esperanto readers, for international literature of an informative nature. Apparently this is true, if one can judge by the ready sale of high class literary works and magazines. Esperanto has reached a point in its development which marks another step towards the creation of a literature of its own; a literature which is world-wide, appealing to men

and women of all shades of thought and culture, creeds and beliefs, as widely apart as Bagdad is from London. The dominant notes in esperanto literature are directness, simplicity and a harmonious rendering of the sense of the thought expressed. Writers have discovered that esperanto enables them to express the finest shades of meaning, which are capable of being understood, and felt by people of all nations. This fact alone assures to the auxiliary world language a continual addition of men and women writers of experience, culture and genius. The latest addition to the list of literary magazines comes from Harbin, Manchuria, "Orienta," is an illustrated review consisting of 90 pages, well printed on good paper. The editor is S-ro I. Sersev—who, by the way is now in Sydney. Most of the articles and stories are of an interesting and informative nature, containing facts, figures and general information which is not available to people of the western nations from other sources. "Literatura Mondo" is another admirable magazine published in Budapest. Among the disappearing magazines is "Literaturo" a London publication; this little journal after 7 years' existence announces its own demise in the last number. Many esperantists will regret its departure from the ranks of esperanto periodicals.

RECENT PRESS NOTICES.

By E. M. Pope, Chairman Ex. Com.
E. A. N. A.

In view of the fact that the newspapers of this country are noticeably silent on the subject of a world language in general, and especially shun any mention of Esperanto, it is gratifying to note that the language problem is fast pushing to the front as the result of the many difficulties attending international gatherings.

On the occasion of the arrival in Chicago of Carl Lindhagen, Lord mayor of Stockholm, Sweden, on Oct. 15, the Chicago Daily News said:

"The Lord mayor was a delegate to the recent conference of the interparliamentary union, which closed recently at Ottawa, Canada, though most of the sessions were held at Washington, D. C. He was far from satisfied with the conference. The delegates were ready to champion nice generalities like 'no more war,' but they were 'too conservative to adopt definite measures that might end war,' he said. He proposed a single language for all nations as a necessity for world peace.

"Mr. Lindhagen's proposal of a world language was one of ten motions he put before the interparliamentary group. Although virtually all the delegates individually favored the motions, collectively they refused to adopt them.

"And yet it is good that we discuss the measures of peace," he said. "Without discussion there never will be adoption, and until there is adoption of constructive measures there always will be danger of war.

"The plan for a world language is not radical. I do not advocate any nation giving up its own language. In the schools of every nation two languages would be taught. In America it would be English and the world language, in France, French and the world language.

"The world would have a common tongue. We could understand each other. Understanding would bring brotherhood. And so, a world-wide language is a spiritual necessity for a united mankind."

"Mr. Lindhagen said that such a language should be one constructed definitely for the new purpose. It should not be any national tongue."

A similar report appeared in the news columns of the Chicago Tribune on the following day. When it is considered that the combined circulation of these two dailies is about a million copies, it will be seen that the international language idea was widely broadcast in those two news items.

Of the Washington meeting of the Interparliamentary Conference, the Post of that city speaks of "legislators from 41 countries groping in a maze of languages," and Henry M. Hyde Washington correspondent of the Baltimore Sun, reported to his paper as follows:

"Perhaps the greatest handicap under which this and all other international conferences labor is the diversity of languages. Among the delegates were groups, each of which spoke and understood only one language. And under the rules every speech had to be translated into at least two other languages. This multiplied by three the time used by each speaker and prolonged the proceedings to the point of exhaustion."

—el Amerika Esperantisto.

RADIO SUKCESO.

Trovigas en germana radio-jurnalo, "Der Saechsische Funk," (La Sakso Radio), la jenan paragrafon:—

"La ĉefpoŝtoŝticejo en Berlino sciigas, ke radio-amatoroj en Melburno, Aŭstralio, letere avizas la regulan partoprenadon al la Esperantaj lekcionoj dissenditaj de Breslaŭ Radio-Stacio."

Ni estus tre dankemaj ricevi detalojn pri tia duflanka granda sukceso.

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriptan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreŝon

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata amiko,

Antaŭ nelonge revenis al Sidnejo Kapitano G. H. Wilkins, kiu esploras la nordajn partojn de Aŭstralio dum unu tuta jaro,, kaj li skribis interesajn artikolojn por la tagjurnaloj pri la tieaj indiĝenoj; nun mi lasos al vi paroli al vi pri liaj spertoj.

“Estis arangite, ke mi akompanu junulon nomita Yarra, kiu povas paroli iomete la Anglan lingvon, kaj liaj kunuloj, kaj loĝi ĉe ilia gento. Ni lasis la protempa kamploĝo je sunleviĝo la sekvantan matenon, kaj por ne malhelpi la ordinara vivmaniero de la indiĝenoj mi portis kun mi nur tiom da pakajoj,—kiom mi mem povis facile porti.”

“Mi decidis ne dungi la indiĝenojn, sed nur vojaĝadi kune kun ili, kaj observadi ilajn murojn. Kelkaj el tiuj ĉi indiĝenoj jam antaŭe vojaĝis kun blankhaŭtuloj, kaj insistis porti por mi la malmulton, kiom mi portis. Nia vojo dum la unuaj du mejlojn estis tra hirudplena marŝaĵo, kie la akvo atingis ĝis niaj genuoj. Mi portis altajn kanvasajn gamaŝojn, sed la indiĝenoj, kiuj estis nudaj, krom snureto ĉirkaŭ la talio, multe suferis.”

“La sango fluadis el multaj vundoj de liaj kruroj, antaŭ ol ni atingis la plialtan sablan landon, sed tuj post ni lasis la marŝaĵon, ili ridis kaj ŝerĉis pri la ĝenaĵoj. Post marŝado de 3 horoj ni atingis valon, kaj en tiu loko la indiĝenoj informigis min, ke ili esperas renkonti aliajn indiĝenojn. Ili haltis, vokis, kaj aŭskultis, sed venis nenia respondo.”

Ni tiam alproksimiĝis al kie antaŭ nelonge brulis fajron, kaj ri pozis homoj, ĉar tie troviĝis kelkaj “Coolamona” (Pladoj faritaj el arĥŝelo) kaj aliaj postsignoj de homoj. Mi demandis, ĉu la virinoj timiĝis je mi, kaj forkuris? kaj mi estis informata, ke ili jam kelka tempo antaŭ ol mia alveno iris ĉasi.”

“Minacis ke pluvos, kaj sen ia sugestio de mi, kelkaj el la indiĝenoj per hakiloj forigis la ŝelon de kelkaj arboj, aliaj portis la ŝelon al la ripozloko, kaj baldaŭ ili konstruis A similan sirmilo per ŝrita ŝelo. Kiam la sirmilo estis finkonstruita, ili lokigis miajn posedaĵojn en la centron, kaj per signoj montris, ke ĝi estas je mia dispono. Pluvigis, kaj mi volante en-

iris la sirmilon, sed la indiĝenoj sidegis ekstere kaj estis kontenta resti en la pluvo. Kiam mi signis al ili, ke ili venu internen, ili surpriziĝis, kaj hezitis, antaŭ ol akcepti.

“Unu post la alia ili eniris, kaj sidiĝis je la rando de la ŝeltapiŝo, kaj aspektis kvazaŭ ili sin trudis. Kamradeco kaj amikeco baldaŭ reĝis, sed estis evidente, ke ili ne tute povis kompreni la sintenado de tiu ĉi fratiĝanta blankhaŭtulo, sed baldaŭ venis ia aplombo kaj ili babladis kaj ridis inter si.”

“Kiam ĉesis pluvi du el ili foriris per serĉi mielon de la sovaĝaj abeloj, sed la plimulto aŭ sidadis aŭ paroladis ĉe la fajro aŭ dormis. Kelkaj el ili nenion manĝis tiun tagon, sed ili estis kontentaj ripozi, kaj ŝajne esperis ricevi ion por manĝi plimalfrue. Pri tio ili ne eraris, ĉar ĉe krepusko revenis la virinoj, kiuj anoncis la alvenon per kriado. Knabeto kiu akompanis ilin portis faskon da palmkoroj, kaj la viroj dividis ilin inter si.”

“La edziĝitaj viroj, tiam lasis nin por viziti la virinojn, kaj mi promenis ĝis kie fonto elŝprucas el la montetflanko. Mi ĉirkaŭ promenis por eviti la lokon, kie troviĝis la virinoj, sed dum mia reveno unu el la viroj alvetenis nudan infaneton, kaj mi alproksimiĝis por rigardi ĝin. Je mia alproksimiĝo la virinoj montris signojn de timo, kaj koveris sin per ŝelo, tiel kiel ili sidis inter du muroj, kaj sub tegmento. Tiu ŝi ŝajne estis nur konvencio, ĉar kiam mi malparade flanken iris, por ke mi bone povu vidi ilin, ili ne sin turnis, sed rigardis min kun scivolemo.

“La infano estis grasvizaĝa knabeto, aĝa eble 6 monatoj, kaj li ekprenis la fingron, kiun mi proponis al li, kaj ĝoje ridis. Tiu ĉi plaĉis ĉiujn, speciale la virinojn, kaj unu el ili malsupren metis la superkoverilon kaj ridetis. Ŝajne per tiu ĉi bonŝanca afero mi gajnis ilian konfidon, kaj gajninta la aprobon de la infaneto la virinoj ne plu timis je mi.”

“Mi jam manĝis mian kondensigitan manĝaĵon ĉe la fonto, sed baldaŭ post mia reveno al la ŝeldometo la knabetoj alportis ion por manĝi, inter aliaj manĝaĵoj, kelkaj bakitaj igitaj, kaj palmkoroj por la viroj, kiuj proponis al mi iom da la manĝaĵoj. Kutime mi akceptas kaj manĝas iom da la indiĝena manĝaĵo, kiam

oni proponas ĝin al mi, kaj tiu ĉi ŝajne multe plaĉas la indiĝenojn. Mia parte mi proponas nur ĝuston de ion, kion mi portas. Se ilia manĝaĵo estas pura kaj bongusta mi plenmanĝas je ĝi, kaj tiam povas esti pli malavara kun la miaj manĝaĵoj, kaj pro tio mi pruvis ke la indiĝenoj estas instigataj ĉasi laŭ siaj propraj metodoj, kaj ke ili ŝatas la amikan interŝanĝon."

"Dum la nokto kaj malgraŭ la pluvo, la viroj rifuzis eniri la ŝeldometon, kaj dormis ekstere, kiel ankaŭ faris la virinoj, ŝirmitaj nur per kelkaj arbetoj fiksitaj en la teron. La indiĝenoj ne vekiĝis ĝis sunleviĝo, kaj post mi jam matenmanĝis ĉe la fento, mi vizitis la lokon, kie mi vidis la infaneton. Tiu ĉi foje la virinoj ne montris timon je mia alpromsimiĝo, sed sidis modeste malantaŭ la ŝelkoveriloj, kaj ne koveris al si la kapojn.

"Estis 3 virinoj ĉe tiu ĉi kamploĝo, kaj ĉe alia kamploĝo, distanco eble cent jardojn, estis 3 aliaj virinoj, unu el ili la patrino de "Yarra" kaj la aliaj 2 liaj edzinoj. Nek la viroj nek la virinoj matenmanĝis kaj baldaŭ ili sciigis el mi, ke ili formarsiĝos al alia kamploĝo."

La viroj unue foriris, kaj la virinoj laŭ sia inklino. Ni sekvis la bazon de la montaro dum du horoj, kaj alvenis ĉe groto, kiu donas bonan ŝirmon kontraŭ ĉia vetero. Evidente la groto estas ofte uzata, la muroj estas koveritaj per multaj pentraĵoj, reprezentante viroj kaj virinoj, kanguroj, fiŝoj, kelonioj, indiĝenaj kanoj, Malajaj pruoj, kaj modernaj velboatoj. Multe da la pentraĵoj estas bone skizitaj. Unu tre bone bildigas la alvenon de la misia ŝipeto ĉe "Groote Eylandt." Sur la ferdeko de la ŝipeto kun veloj malaltigitaj troviĝas viroj, kiuj pretigas la ankron. Viro kiu portas misia robo staras ĉe la direktilo, kaj inter la ferdekoj, kaj montrita tra la flankaj de la ŝipeto estas du virinoj, kiuj portas ĉapelojn.

En venonta letero mi denove skribos pri la spertoj de Kapitano C. H. Wilkins. Kun amika saluto, via fidele. P. H.

HERE AND THERE.

Archeology. The important magazine *Revue des Musees* desires to get into touch with archeologists throughout the world, and is willing to re-

ceive and publish articles in Esperanto. Secretary of the Esperanto fako: Robert J. Filliatre, 28, Rue de l' Agent Dufraine, Saint-Cyr l'Ecole (S. et O.), France, who urgently desires those Esperantists interested in archeology to write him.

Boot Industry. E. Wiener, Raunhentalstr. 2, Meissen, a/E, Germany, is collecting information on the boot industry throughout the world by means of Esperanto, and wishes to get into touch with all Esperantists in the trade.

Esperanto and Science. Thanks to the generosity of an anonymous friend, the B.E.A. is able to distribute free of charge any reasonable number of the report on the International Conference on the use of Esperanto in Science held in Paris last May. Thanks to the same friend nearly 20,000 copies have been distributed or reprinted in various technical magazines.

Japanese Aviators carry Esperanto Message.—An interesting account appeared a while ago in Soviet Siberia, a daily newspaper published in Nova Nikolaevsk, of the arrival of two Japanese aviators flying from Tokio to Moscow. These aviators carried with them a letter to Soviet Siberia from the Japanese newspaper *Osaka Asahi* and the Japanese Esperanto Association. The letter, written in Esperanto, contained greetings to the Russian people from the Japanese people.

"*Osaka Asahi*," stated the letter, "recognises the tremendous importance of the four chief means of union between peoples—Aviation, Radio, Esperanto, and the Kinematograph, and in every possible way is helping their spread and growth."

The letter drew attention to the regular Esperanto features in *Asaka Asahi*, and proposed the organisation of exchange of films, and also radio communication with the help of Esperanto.

L'Orchestre Sabini.—"During the hearing of a case at Marlborough Street the depositions were interpreted in French to the accused. The Clerk used the expression "the Sabini band," which the interpreter rendered as "l'orchestre Sabini," to the great amusement of the Court."—From "The Star." (Thus are we at the mercy of interpreters!—Ed.)

KRONIKO.

SIDNEJO, N.S.K. — "Radio," el inter radianoj, kaj laŭ sciigo de la raktantaj la progreson de nia lingvo peranto, kiel ĝia fratina ĵurnalo. Ofte aperas "Esperantaj Notojn" pritredaktoro, konstanta fako en ĉia numero baldaŭ fariĝos. — Antaŭ kelkaj monatoj la eldonejo letere elsendis tutmondan enketon pri radio-disaŭdigado, ĝia progreso, potenco kaj lingva limigo, uzante Esperanton por neangle parolantaj landoj. La rezulto publikigis en "Radio" dum proksimaj semajnoj, okupantaj kelkaj sinsekvaj numeroj; la esperantlingvaj respondoj (anglen tradukitaj por la legantaro ricevos elstaran mencion.

Pro oficiala transloĝiĝo al Newcastle, N.S.W., la longjara prezidanto de la Sidneja Esperanto-Societo, S-ro. Frank V. Taylor, estis devigita forlasi la klubon. Por honorigi liajn senlacajn laborojn la membraro nun klopodas doni al li kaj lia edzino taŭgan memoraron. Nova prezidanto ne estos elektata ĝis la jarkunveno dum junio; intertempe la vic-prezidantoj, S-roj. A. Auwart kaj F. T. Simon, agos.

S-ro Pfahl faris la dekduan radio-paroladon pri Esperanto ĉe 2FC Radio Stacio, la 18an. Februaro, kaj la dek-trian la 9an. Marton.

MELBURNO. V. — La programeroj de la Melburna Esperanto Societo dum la lasta monato estis tre interesaj. Denove la anoj interesiĝis pri la vojaĝspertoj de S-ro F. Hudson en Suda kaj Centra Afriko. La traduko de infanejajn rimojn multe amuzigis la anojn. S-ro Sekfy donis bonan paroladon pri Hungarujo, kaj alia popolo. Multaj partoprenis en la debato, "Ĉu Australianoj dediĉas tro multe da tempo al sportoj." Post vigla debato la plejmulto voĉdonis, ke ne. Laŭ la "British Esperantist" ĵus ricevita, F-ino Virginia M. Cox, la sekretario de la M. E. A. gajnis La B. E. A. Diplomon. Korajn gratulojn.

DARGAVILLE, Nov-Zelando. — Sub gvidado de lia pionira moŝto, S-ro Alfred Gregory, la klaso denove funkcias; dum multaj jaroj Dargaville posedis klason, sed dum pasintaj dekdu monatoj interrompo okazis.

WELLINGTON, Nov-Zelando. — La multaj geamikoj de S-ro W. L. Edmanson bedaŭros aŭdi pri ties kvin semajna malsano. Je la kvara januaro severa tertremo okazis ĉe Wellington, kio tre malbone difektigis la nervsistemon de la sinjoro devigante al li enlitiĝi, nuntempe li malrapide resaniĝas.

WHANGAREI, Nov-Zelando. — S-ro Tilly, D.B.E.A. Deligito de M. E.A. raportas, ke dum tria semajno de februaro li brodkastos en la intereso de Esperanto perradie el stacio ĉe Whangarei. Tiu stacio estas la dua, kiu komencis brodkasti en Esperanto; kaj povas esti taksata, kiel alia signo de progreso de la lingvo en tiu ĉi malproksima insularo.

PASTRO SERIŠEV.

Aŭstralio estas tiel for de la ordinara trafika vojo de l'mondo, ke oni nur malofte havas la feliĉon persone saluti mondfamajn esperantistojn. La lasta okazo kiam tia plezuro trafis Aŭstralianojn estis dum 1912, kiam la nun mortinta lingvo-batalanto D-ro Pollen vizitis la precipajn havenojn sur pasaĝerŝipo fiere flirtante la verdan standardon.

Dekkvar jaroj forpasis kaj nun preskaŭ nova generacio de esperantistoj povis bonvenigi alian bonkonatan samideanon en Sidnejo, (Sydney). Estis Pastro Inocento Seriŝev, el Harbin, Manĝurio, kies nomo ne nur estas konata kiel valorega propagandisto en orientaj landoj, sed kiel verkanto de diversaj libroj, senfinaj gazetartikoloj, kaj lasttempe kiel redaktoro de l'nova laŭdinda 100-paĝa esepanta revuo "Oriento."

Je la komenco de januaro nunjare. Pastro Seriŝev alvenis el Nagasaki per vaporŝipo "Aki Maru," malrapide travojaĝinte Hinujon kaj Japanujon, samtempe aldonante sian riĉan, imtiman konon de tiuj landoj en sperta maniero. Akompanita de familianoj li ne estis, sed esperas tre baldaŭ venigi sian edzinon kaj du infanojn.

Kaŭzoj de lia elmigrado li donis al kunvenigintaj Sidneja Esperantistoj dum tre flua spirita parolado kelkaj tagoj poste. Ĉirkonstancoj en Harbin kaj la tuta ĉirkaŭaĵo estas ekonomie kaj politike malbonaj, tial leginte multon pri la lando de "lakto kaj mielo" kie ĉiuj vivas pace kaj laboras, li decidis provi la sorton kaj kun konsilo de S-ro L. M. Pfahl, loka delegito de U.E.A., li venis.

Unue li portis salutojn de la Pekina Esperanta Kolegio (kiu tiel afable sendis belegan silkan memoraĵon kaj "domgardiston" por la lastjare okazinta Aŭstralazia Esperanto-Kongreso en Melbourne), kune kun personaj salutoj de vaganta Aŭstraliano, Ŭ-ro F. H. Williams, due el Japanujo "etendante la manojn trans la maro al niaj samideanoj en Aŭstralio," kaj fine de diversaj grupoj tra la Oriento.

Kiel neniam antaŭe li spertis la utilecon de Esperanto, li diris. Depost la tempo kiam li sendis unuan poŝtkarton helpe de vortaro al nememorigita korespondanto en Aŭstralio, tiamaniere enkondukante sin al fremdaj landoj, li trovis, ke kie ajn terparto oni vizitas ĉiam troviĝas familian rondon.

Rakontinte multon pri la Oriento en mallonga tempo, Pastro Serišev findiris, ke li nun intencas scii la kondiĉojn en Aŭstralio, daŭrigi sian helpon al la movado laŭpove, kaj poste eble per alvokado de samnaciaj esperantistoj starigi "Esperantan kolonion" sur la kamparo.

Ĝis la alveno de liaj familianoj la Sidneja Esperanto-Societo sendube havos la feliĉon kalkuli lin kiel energian gvidanton per kies sperto ĉiuj membroj multe profitos.

"KATALUNA ANTOLOGIO."

Estas jam duone presita la "Kataluna Antologio." Tiu ĉi granda verko enhavas elektitajn pecojn de katalunaj poetoj kaj prozistoj, antikvaj kaj modernaj. Ĝi estas presata sur linpapero kaj okupos pli ol 400 paĝojn.

La versaj kaj prozaj tradukoj estas faritaj de lertaj katalunaj esperantistoj, sub la gvido de Jaume Grau Casas, kompilinto de la "Antologio." Ĝia stilo estos plene Fundamenta.

Krom la tradukitaj literaturaĵoj, estos en la libro noto bio-bibliografia pri ĉiu aŭtoro, kelkaj popolkantoj verse tradukitaj kun la koncernaj melodioj, kaj studo pri la katalunaj lingvo kaj literaturo. En tiu ĉi studo estas speciale pritraktataj la verkoj de la famaj mezepokaj Trobadoroj, ĉu Provencaj, ĉu Katalunaj. Estas ankaŭ rimarkindaj kelkaj komparoj de la kataluna lingvo kun la hispana, la franca kaj la itala.

Petu detalejn al la kasisto de "Komitato por Kataluna Antologio": S-ro Eduard Capdevila, str. Carders, 29, Barcelona.

PRINTEMPA VESPERO.

Estis trankvila printempa vespero. La subiranta suno elsendis siajn orajn radiojn kiel lastajn salutojn de la tago kaj grupo de fortstaturaj betuloj trapenetris purpura brilo de la vesperruĝo. Kanto de birdoj jam antaŭlonge silentiĝis — ĉie estis trankvile, nur de malproksime sonis mildaj tonoj de korno, kiujn ĉi tien malforta printempa zefiro alportis sur siajflugiloj, movante foliojn de la arboj, kiuj alpremiĝis al si kvazaŭ ili flustrus fabelon de juneco. Nenio interrompis la sanktecan kvieton. Subite sur randon de senarbigita loko elkuris kapreolino; ĝi haltis por aŭskulti sonojn de la korno. Momenton ĝi staris senmove, poste ĝi kiel pafaĵo turniĝis por ree malaperi en la arbaro. Ekestis denove tomba trankvilo; eĉ la tonoj de la delikata instrumento silentiĝis. Suno estis jam subirinta. Vesperigis; vesperruĝo paligis, ĝis ĝi malaperis plene. Siluetoj de la arboj unuigis en malproksimo kun venanta mallumo. Sur ĉielo ekbrilis Venuso kaj poste la ceteraj steloj. Al ĉiuj tronis pala luno, kiu desegnis sur la tero akrajn ombrojn. Sur turo en la urbo finsonis la oka horo kaj sonorado de sonoriloj eniĝis profundan vesperon trankvilon. Ĉio en la naturo ekdorinas por morgaŭ vekigi al plua vivo — al plua laboro.

LA FAMILIA BUDGETO DE LERTA LABORISTO EN RUSLANDO.

La semajna informilo de la Internacia Laboroficejo eldonas ciferojn, elcerpitaj el Rusa oficiala publikigaĵo montrantaj la familian budgeton de lertaj laboristoj en Moskvo.

La enspezo de la familio estas dividita laŭ tri rubrikoj: (a) enspezo de la famiilestro, kiu konsistigas 75, 5% de la tuto; (b) enspezo de aliaj membroj de la familio, 14,2%; kaj (c) diversaj enspezoj, tio estas, pruntoj, kreditoj, donoj, k. t. p. 10, 3%.

Komentariante la rezultatojn de la enketo, la oficiala Rusa Bulletin diras, ke "pruntoj kaj kreditoj konsistigas tre gravan fonton de monata enspezo por la laboristoj."

Sub la rubriko "elspezoj," 3,6% de la tuto konsistas el kotizoj al sindikatoj kaj pagoj al diversaj komunistaj organizaĵoj, dum la sumoj asignitaj por la edukado de la infanoj kaj por la laboristoj mem kaj la plen-

kreskaj membroj de ilia familio estas apenaŭ 0,6% de la tuta elspezo. (Informservo de la Internacia Laboroficejo, 103-B.)

RADIO AND AN INTERNATIONAL LANGUAGE.

Every radio enthusiast must have been reading with interest the weekly articles under the above heading in the Radio Supplement. The articles speak for themselves, and in view of the facts, one can but conclude that the only solution of the difficulty is a neutral, artificial language. And Esperanto is the only neutral, widely-known language which has proved itself fitted for every purpose of modern life, including Radio.

The supporters of one of the national tongues are pathetic in their belief that it will be possible to boost one of them into the proud position. English is the most widely suggested, and the idea is good from the English standpoint, but the French and Germans are too good business men to allow such a terrific commercial advantage. And it is quite in their power to stop it. Moreover, the national languages are too hard, and excepting perhaps Italian and Spanish, the vowels and pronunciation generally are not suitable for international broadcasting.

Dr. Bredow in Radio Supplement of 25th December, treats German as the Radio language, and actually commences with this phrase:

"It is quite comprehensible that every country whose sons travel round the world should prefer its own national tongue as a world language," and adds later "that which we complain of in English—that it is not fluent in intonation and rhythm—applies also to German, perhaps more so; also our sentence-construction is not systematic throughout."

Esperanto requires from five to eight months study—English and

German five to eight years, so why labour the point further in these busy times?

PRINCIPO DE SUFICO.

La Akademio rekomendas al la Esperantistaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto:

(a) Principo de neceso: en konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentantan de tiu vorto;

(b) Principo de sufiĉo: se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; **sekretario** f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. **Kunveno:** Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. **Vendrede** vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunveno: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. **Prezidantino** F-ino C. M. Hannaford. **Sekretario** kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. **Prezidanto:** S-ro H. Byatt, **Sekretario:** F-ino I. Thomas, **Kunveno** kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, **merkrede** vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. **Kunvenas** ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). **Guste** apud la ĉefstacidomo. **Prezidanto:** S-ro F. V. Taylor; **Sekretario:** S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

ESPERANTO BOOKS.

The Melbourne Esperanto Society has a stock comprising books suitable for beginners and more advanced students, and standard literary works. The following list is a selection from the stock. The Society is regularly importing supplies of new publications as they appear.

Orders may be addressed to the Hon. Librarian, Box 731F. G.P.O. Elizabeth St., Melbourne, and postage must be added to all remittances at the rate of 1d. for each shilling.

Cox's Commentary and Grammar	4 6
Edinburgh Pocket Dictionary	2 0
Hyde's Guide	2 6
Dictionary (Esp.-Eng.) Fulcher and Long	7 6
First Steps	1 0
Esperanta Teacher (Fryer)	1 6
Krestamatio (Zamenhof)	4 0
Esperanto Key	0 3
Esperanto (Page)	2 0
Konkordance de Esperanto	0 9
Aladin, aŭ la mirinda lampo	0 9
Abaro Bruas	0 9
Alegorioj de la Naturo (Gordon)	1 0
Abismoj (Jean Forge)	3 3
Al la forbuĉitaj popoloj	0 6
Aventuroj de la Kalifo (Cox)	0 9
Batalo de la vivo (Dickens)	1 3
Barbra	1 3
Blond Ekbert (Fischer)	0 9
Biblio-grafio (Esp.-Pola)	0 9
Batalo pri la domo Heikila	1 9
Devoj de la Homo	0 9
Deklaracio	2 6
Du Noveloj	2 0
El la Skizlibro	2 3
Elektitaj Noveloj	1 9
El la Kamera Obscura	1 6
En Svislando (Ramo)	3 0
El la proksima oriento	2 0
Elektitaj Humoraj Rakontaj	1 0
Fundo de la mizero (Kabe)	1 6
Funebra Parolado	0 9
Farmacio de Hemio	0 9
Fatala Suldo (Dalsace)	1 6
Fabeloj (Anderson)	3 0
Gejges kaj lia ringo (Hebbel)	2 9
Georgo Dandin	2 6
Himnaro	2 0
Hermano kaj Dorotee	1 6
Hamleto	1 6
Internacia Kantaro (music and	

words)	2 3
Imenlago (Storm)	1 3
Interesa Novelaro	0 9
International Language (Clarke)	2 3
Interrompita Kanto (Kabe)	1 3
Kvar-voĉ Kantoj	0 3
Karmen (Meyer)	1 6
Kaŝitaj vortoj de Bahilah	1 6
Karlo (Privat)	0 9
Lia lasta ŝanco (Gordon)	1 0
La Karavano (Eggleton)	2 0
La Neĝo	2 9
La Fianĉiĝo	1 6
La Reĝo Judeao	2 3
La Fina Batalilo (Wilson)	2 3
La Mizeruloj (Hugo)	3 0
La Faræono (Kabe)	10 6
Lastaj tagoj de Dro Zamenhof	1 0
La Kantistino (Wuster)	1 3
La Vendetta	2 0
La Rabistoj	1 3
La Rivozoro	0 9
La Lasta	0 6
Lilio (Sinnotte)	3 0
Mirinda Amo (Luyken)	3 9
Mimi (Payson)	1 3
Nuntempaj Rakontoj (Krestan-off)	1 6
Oni Ridas	1 3
Perdita kaj retrovita (Boirac)	0 6
Patroj kaj filoj	3 0
Progresado de la Pilgrimanto (Bunyan)	1 9
Petro Schlemihl (Wuster)	1 6
Pri Cervantes	1 0
Rakontoj el la Biblio	1 6
Reĝo Lear	3 0
Songo de Someromeza Nokto	1 6
Ŝi kliniĝas por venki	1 3
Serĉado por la ora ŝaflano (O'Connor)	0 9
Tatterly (Wilson)	1 3
Tra la Mondo—Part 1, 1/3; Part 2, 2/-	
Vivo de Zamenhof (Privat)	3 6
Esperanto Star Badges, buttons, brooches, pendants, tie pins	1 6

ESTRARO DE LA AKADEMIO.

por la jaroj 1926-1927-1928

(laŭ la lastaj elektoj)

Prezidanto: Prof. Th. Cart. Vic-prezidantoj: S-ro Warden kaj D-ro Dietterle. Direktoroj de la 3 Sekcioj: Prof. Grosjean-Maufin, D-ro Liffmann, D-ro Privat.